

TÉLÉPHONE 0-68

BOULOGNE SUR MER
31, BOULEVARD MARIETTE

la 20^{an} de Feb. 1923
17 h 30

Kara Samideano.

Eble vi demandas vin ĉu mi intencas sekvi vian malbonan ekzemplon + iĝi prokrastemulino, sed ne timu. Kvankam mi certe ne respondas tiel rapide kiel se vi estus ĉiam respondinta sufiĉe rapide ... ĉar mi ne volas devigi vin respondi de nove rapide + eble malbenigi la sorton kiu donas al vi korespondantinton tiel diligentan.

Al vi mi dankas multege pri via letero de la 27^a de Jan, de gazetaj elĉerpaĵoj + de via P.K. de la 12^a de tiu monato.

Granda estas la plezuro kiun viaj skribaĵoj ĉiam donas al mi. Neniam tiu plezuro mia malpli grandigis + jen nun 2 jarojn 1/2 en kiuj ni interskribis.

Vi diris en via P.K. ke vi pensas same kiel mi, ke vi timos ke okazos milito kiu malhelpos la Kongreson kiel en 1914. Sed, ĉu estas eble ke mi diris tion? Mi ne pensas. Ŝajnas ke mi diris ke mi timaske pro la malamikeco de la Germanoj al la Francoj ke ni Francoj, ne povos ĉeesti la Kongreson.

Mi ne kredas ke okazos milito. Ho! Tio ne estos ebla, diru, post la teruraj okazintaĵoj. + kie oni trovos monon?

Mi nun estas abonita al "Esp. Triumfonta" mi nur ricevis ĝis nun la N^{ojn} de 114 ĝis 122 + la postaj ne alvenis – eble pro la okupado de la Francoj. Mi tamen esperas ke pli aŭ malpli frue ili alvenos ĝis mi. Mi ŝatas tiun ĵurnalon!

Mi ricevis fine, dank' al viaj klopodoj, leteron de S^{ro} Pastoro Varszaly. Li ne senkulpiĝis pri du jaroj da nerespondo. Ŝajnas ke la vivo en Amerikujo ŝanĝis lin. Tamen li petis ke mi respondu al kelkaj demandoj ĉar li deziras skribi ilin en gazeto amerika. Jen ili estas:

1. Kian opinion havas la franca publiko pri Ĉekoslovakujo?
2. Kian opinion havas la franca publiko rilate al la estonteco de Ĉ. Sl.
3. Ĉu la franca publiko scias ke en Ĉ.S. ekzistas "popolo" rusa kiu ricevis autonomion en pacokonferenco en Parizo? Ĉu ili scias ke tiu autonomio estas nur sur papero.
4. Ĉu la franca popolo scias ke tiu rusa popolo estas malkontenta kun Ĉ.Sl. registaro?
5. Ĉu la franca popolo scias ke la Ĉ.Sl. registaro blindigas la mondon dirante ke la rusa popolo ne estas kultura + tial ne povas doni la autonomion?

Poste li petas ke mi sendu tradukitajn de mi ĉiujn artikolojn pri Ĉ.Sl. en gazetoj francaj - + ankaŭ de Podkarpatska Rus (???) Kiu estas? + kie troviĝas ĝi?

Ĝis nun mi nenion respondas. Li tre bone povas atendi. Mi multe laboris pri li, pri lia enŝipigo + li nenion skribis dum 2 jaroj. Nun, li atendos.

Poste – pri liaj demandoj, estas simple – la franca popolo ne tre instruita nenion scias pri via lando – nek lokon, nek nomon. La instruitaj personoj ne multe pli scias + ne scias pri la autonomio por la Rusoj. Mi parolas pri la plejmulto, nature. Tiuj kiuj speciale okupiĝas pri eksteraj aferoj certe scias tion + aliaj kiuj jam vojaĝis en via bela lando. Ĝenerale la Francoj ne vojaĝas multe + ili estas hejmrstantoj ... En mia urbo (50 000) nur ni + 2 aŭ 3 aliaj vojaĝis tiel multe.

Mi supozas ke vi scias ke Boulogne s/M ne estas en Normandie aŭ en Bretagne mais¹ en

¹ "mais" en la franca signifas "sed"

"Artois". Nun, tiuj provincoj ne ekzistas + estas departamentoj (86) + nia estas "le Pas-de-Calais". Strange estas montri al vi la preĝejon S^t Michel – tute malgranda, malbone lokita preĝejo. "Notre Dame" sur monto, estas nome "la Cathédrale" + antaŭ unu jaro la tuta tegmento enfalis!!!

Tiu katedralo estas antaŭ nia domo – je 100 metroj. Matene, la suno leviĝas aliflanke de la granda kupolo + en mia lito matene, mi admiras la diafanecon oran.

De post la faliĝo de la tegmento ni ne plu aŭdas la grandajn sonorilojn. Ili ĝenis la dormon precipe kiam riĉulo mortis. Mi kunsendas P.K. en kiu vi iomete povas vidi tiun grandan preĝejon. Ĝi estas en malnova urbo ĉirkaŭata de muregoj tre belaj kie kreskas malnovaj arboj. Estas la plej vidinda belaĵo de Boulogne. Sube, estas grandaj arboj, bulvaroj kiuj ĉirkaŭas tiujn muregojn. Unu, la plej grava estas B^d Mariette. En tiuj muregoj ekzistas 4 grandaj pordegoj tre malnovaj, nuraj peroj por eniri en tiun tre malnovan bigotan urbeton. La nova urbo estas malsupre de la monteto.

Gratulojn por via elekto de Prez. de via politika partio. Efektive vi ŝajnas tre okupata precipe vespere. Tamen, mi fidas + esperas ke vi ne iĝos ankoraŭ pli malbona korespondanto.

Mi ne dancis la tutan vintron. Mia filo estas en Germanujo + mi ne eliras escepte por iri al la Cinéma aŭ ludi bridĝon. La dancoj de lasta jaro en hotelo ne plu ekzistas. Mi iris al balo privata en belegan, artan domon sed nur la junaj gefraŭloj dancis, ni ludis bridĝon.

Mia edzo estas tiel laca vespere + li estas tiel kontenta restadi apud mi + legi (kiam li ne laboras) + mi havis la "gripon" (influenza) + estis malsana en la kapo + ni tute ne deziris eliri.

Kian teruraĵon idiotan ke la mortigo de D^{ro} Raŝin. Diru al mi ĉu li mortis fine.

Mi esperas ke vi trioje fartas bone + ne havas malvarman vintron. Tie, tute ne sed ho! kiel malseka + nebula ĝi estas. Hodiaŭ, hazarde, estas seke + nur 1°.

Ĝis la revido, kara Samideano + prokrastemulo, en sendube post du monata respondo. Tamen, mi komprenas tre bone. Vi estas okupata + ne povas ofte skribi. Mi komprenas ĉion.

Sincerajn sentojn

Alice Sergeant

Via P.K de Narodni divadlo vekigas memorojn de Praha Kongreso kiam haltis tramveturiloj k.t.p. Bela ĝi estas.